nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2024

## ZAMENHOF-TAGO DENOVE EN FUENLABRADO

Kiel tradicie en Esperantujo, denove ĉi-jare ni festos la Zamenhofan Tagon. La festo okazos ĝuste la 15-an de decembro ekde la 11,00 horo.

La loko estos la sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-Ligo, tre ampleksa, kaj facile alirebla el la ĉefurbo aŭ aliaj madridaj urboj, ĉar ĝi troviĝas je 300 m de la haltejo "Fuenlabrada Central" de RENFE kaj metroo. Ĝi lokiĝas ene de la C.E.P.A. "Paulo Freire" kiu konsistas el kvin konstruaĵoj. Oni devas eniri ĉe Av. de las Naciones, tra la pasejo por aŭtoj kondukanta al interna parkejo (jen la adreso per Google Maps: https://maps.app.goo.gl/wcgZRa54bsvncX2y6).

Kaze ke vi ne scias kiel alveni, grupo da partoprenantoj renkontiĝos ĉe la enirejo de la fervoja haltejo je la 10,45.

Por kio? Ni ĝuos prelegojn kaj aliajn programerojn (ni detalos ilin post kelkaj tagoj). Meztage, ni kunmanĝos en ordinara restoracio.

Ĉu vi venos? Se jes, ATENTU, ni bezonas scii kiom da homoj venos por la tagmanĝo ĝis la fino de novembro. Se vi volas partopreni la tagmanĝon, sendu mesaĝon al madrid@esperanto.es. Kompreneble, por ĉeesti la feston ne necesas antaŭanonciĝi.

Pliajn detalojn bv. legi en https://eventaservo.org/e/6d20c9 kaj baldaŭ en la retejo de MEL..

## NI KONDOLENCAS

Kun ioma prokrasto ni eksciis pri la forpaso de du tre veteranaj kaj aktivaj esperantistoj membroj de la Madrida Esperanto-Liceo, Angelita Sanz Mayor kaj Pepe Platas.

### FORPASIS ANGELITA SANZ MAYOR

Antaŭ du monatoj forpasis Angelita Sanz. Iu samklasano en ateliero rimarkis ŝian mankon kaj post atentigo al la urĝo-servo oni konstatis ŝian forpason. Ni jam sciis pri ŝia febla sanstato sed ŝi plenumis striktan dieton kaj medicinan kontrolon; tial la novaĵo pri ŝia forpaso ŝokis nin.




Angelita, naskiĝinta en la vilaĝo Valdevacas, Segovia provinco, estis oficisto en la Ministerio pri la Fisko (*Hacienda*) kaj estis membro de Madrida E-Liceo ekde 1982. Ŝi membris ankaŭ en HEF. Ŝi regule partoprenis la lundajn babiladojn de MEL; ĉeestis multajn kongresojn hispanajn kaj internaciajn, per longaj busaj vojaĝoj tra Eŭropo. Ŝi frekventis ankaŭ la kongresojn de fervojistoj kaj la Kulturajn Semajnojn en Katalunio.

Malgraŭ sia alta aĝo, ŝi havis grandan kulturan aktivadon, partoprenante diversajn atelierojn en la centroj por maljunuloj de sia kvartalo, vizitante ekspoziciojn en Madrido kaj ĉeestante prelegojn, teatraĵojn kaj kulturajn vizitojn.

Ŝi ripozu pace.

### FORPASIS PEPE PLATAS

Ankaŭ ni bedaŭras la forpason de José Francisco Platas. Lia alta aĝo, liaj vid-problemoj kaj fine lia Alzheimer-malsano provokis, ke antaŭ kelkaj jaroj li ĉesis veni al niaj lundaj babiladoj. Ŝia edzino Paquita informis, ke li forpasis pasintan aŭguston.

**nia voĉo** **decembro 2024**

Pepe estis la plej veterana el la madridaj esperantistoj; li lernis la lingvon en 1966 kaj dumlonge partoprenis la babiladojn kaj kunlaboris en la agadoj de Liceo, inter alie, kiel ĝia kasisto. Ankaŭ li membris en HEF.



Li havis interesan vivon. Instigata de sia onklo, li iniciĝis en cirk-arton. Pepe elektis la fakon ŝnurdancadon, surprenis la kromnomon *Volatín*, kaj ludis en multaj cirkoj, teatrejoj kaj kinejoj hispanaj kaj eksterlandaj. En tiu medio li konatiĝis kun Paquita, iniciĝinta en trapezo, kiu fariĝis lia edzino. Sed en tiuj malfacilaj postmilitaj jaroj li devis plenumi aliajn metiojn; rekta vendado de parfumoj, poste kelnero kaj kukfaristo kaj fine, ĝis emeritiĝo, li laboris en banko, kie li estis tre estimata de la kunlaborantoj. Li frekventis la kunvenojn de la Klubo de klaŭnoj kaj cirkartistoj de Madrido, kaj partoprenis kelkajn televidprogramojn kaj filmojn dublante aktorojn sur la ŝnuro aŭ kiel krom-aktoro.

Amatora pentristo, tre legema, aŭtoro de la libro *Ases y figuras estelares del alambre (Elstaruloj de la ŝnur-danco)*, li lasas vidvinon, tri gefilojn, nepojn kaj pranepojn. Pepe, ripozu pace.

## NOVAJ INFORMOJ PRI LA VENONTA HISPANA KONGRESO EN SORIO




La retejo de la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio komence de majo, jam disponas je plej praktikaj informoj: loko, transporto, gastigado, ktp. Ankaŭ iom pri la programo, sed pli definitivaj detaloj aperos tre baldaŭ.

La adreso estas: https://kongreso.esperanto.es/, kaj tie vi trovos ankaŭ la aliĝilon.

La unua aliĝperiodo kun rabatita kotizo finiĝos la 31-an de decembro. Profitu la okazon, kaj rapide rezervu ankaŭ loĝadon kaj transporton, pro la altiraj datoj de la ponto de majo.

## PLIAJ INFORMOJ KAJ KONTAKTOJ

Ni memorigas ke ni renkontiĝas ĉiujn lundojn en la sidejo, ekde la 18,30 horo, por babili kaj praktiki Esperanton. Ĉiu esperantisto estas bonvena, sendepende de sia lingvonivelo. Notu tamen ke pro la pluraj decembraj festoj, ni ne povos certigi malfermon ĉiujn lundojn, do bv antaŭe interkonsenti. Ĉimonate ne okazos unuasabata renkontiĝo.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter* aŭ *X*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com